

NEDERLANDA **KATOLIKO**

OFFICIEEL ORGAAN VAN DEN NEDERL. R. K.
ESPERANTISTENBOND „NEDERLANDA KATOLIKO”

FEBRUARI 1931

No. 10



Adressen.

Het adres van het secretariaat van „Nederlanda Katoliko” is thans: J. H. WESTEN, Melkweg 10, Groningen.

Hier geve men dus op: alle nieuwe leden voor onzen Bond, benevens alle veranderingen in de ledenlijst van de plaatselijke afdelingen. Ook adresveranderingen daar te melden.

Het adres van den Penningmeester van „Nederlanda Katoliko” is: J. A. LEIBBRAND, Rozenstraat 12, Tilburg.

Aan dit adres gelieven de individueele leden (dat zijn leden op plaatsen, waar geen afdelingen van N. K. zijn gevestigd) hunne contributie, bedragende f 2.— per jaar te zenden. Postgiro 121449.

De penningmeesters der plaatselijke afdelingen zenden aan dit adres iedere drie maanden de contributie voor hunne afdeling.

Het adres van de redactie-commissie van het orgaan „Nederlanda Katoliko” is: H. HAENEN, Tempsstraat 22, Heerlen.

Aan dit adres dus alles te zenden, wat de redactie betreft; ook de verslagen van de secretarissen der afdelingen. Het papier is slechts aan één zijde te beschrijven, en dit laatste vooral duidelijk. Machineschrift verdient de voorkeur.

Inzendingen moeten vóór den 15den der maand te Heerlen zijn.

Aan den inhoud van ons orgaan moeten allen naar beste krachten medewerken. Wat goed is, wordt zoo mogelijk geplaatst. Verlies echter den moed niet, wanneer uwe inzending naar de snippermand verwezen wordt.

Het adres van den administrateur van ons orgaan is: J. A. LEIBBRAND, Rozenstraat 12, Tilburg.

Aan dit adres vervoege men zich voor abonnement voor niet-leden van N.K. (onze bondsleden krijgen het orgaan gratis). De prijs van het jaarabonnement is f 1.50.

Onze administrateur houdt zich ook zeer aanbevolen voor het plaatsen van advertenties. Men vrage hem de tarieven.

De abonné's gelieven hier hunne eventueele adresverandering op te geven. (De leden van N.K. doen dit bij den secretaris, zie boven).

Aan allen: Schrijf steeds duidelijk, ook Uw naam en adres!

NEDERLANDA KATOLIKO

Maandblad, officieel Orgaan van den Nederlandschen
R.K. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko”,
gevestigd te 's-Hertogenbosch.

Opgericht 29 Augustus 1909. Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd
Ĉio per amo, nenio per forto. (*S. Franc. de Sales*)

Geestelijk Adviseur LAMB. J. J. M. POELL

Abonnementsprijs
f 1.50 per jaar
Eksterlanda Jarabono. f 2.—

Adres der Redactie:
H. HAENEN
Temptstraat 22
HEERLEN

Afzonderlijke nummers
20 cent.
Advertentiën
30 cent per regel.

Administratie: J. A. LEIBBRAND, Tilburg.

SALUTON AL ĈIUJ:

Silentiginte ĉiajn konsideraĵojn, ne pretekstojn, miajn, mi cedis kaj akceptis la al mi proponitan taskon de redaktoro de nia organo „Nederlanda Katoliko.”

Ke tiu tasko estas nek facila, nek dankiga, ne gravas, se mi nur sukcesos esti utila je nia Nederlanda Katoliko Esperanto-movado.

Ĝe kia maniero mi povos esti tia?

La respondon pri tio mi povas doni nur ĝenerale. ne detale. Mi nur klare scias, ke nia movado povos kreski, nur, kiam ĉiuj bonvoluloj partoprenos je tiu tasko.

Dank' al Dio, N. K., nia unuiĝo, ne havas maltroon je pri tio kompetentaj anoj. Tamen ni memoru, ke la progresado de nia movado ne estas afero nur de la estraro, nek de la redaktoro. La estraro gvidu la anaron, se necese sub la kontrolo de la Eklezia Konsilanto, por ke ni, marŝante ne devojiĝu de la vojoj, montritaj kaj indikitaj per nia organo.

Por efike plenumi tiun respondecan taskon nia organo estu ne nur vojmontrilo, sed samtempe kondukilo, informilo, instruilo, ligilo kaj propagandilo.

La helpo de ĉiuj ni bezonos por la manipulado de tiuj diversspecaj iloj. De ĉiuj, ĉu ili jam estas malnovgvardianoj, precipe ili; aŭ ĉu ili estas novgeneracianoj. Dankon al tiuj, kiuj en ĉi tiu kajero tiurilate jam montris sian pretecon.

Ĉiu el ni ekkaptu, laŭ siaj apartaj kapabloj, ebloj, kaj cirkonstancoj, tiun ilon, kiu estas konvena al li; sed neniu, kia li aŭ si estu, restu senlabora. Aankaŭ en la Esperanto-movado jam estas

tro multe da nedevigaj senlaboruloj, kiuj pro manko de fervoro kaj amo lasas la laboron al aliaj. Tiu situacio nepre ŝanĝu, se ne, ni devos atendi ankoraŭ tro longe ol ni atingos la celitan celon. Ĉu la estonto ne estas nia? Pliproksimigi tiun estonton, jen, nia devizo.

La komuna laborado super tiu vasta laboro povos kaŭzi, malgraŭ ĉies bona intenco, malsimilajn konceptojn kaj ideojn; tia malsimileco ne malutilas; ĝi povas eĉ pligrandigi la generalan interesiĝon por nia afero; se ni nur amikece kaj samideanece klopodu konvinki unu la alian

Por defendi tiamaniere siajn opiniojn, konigi sian kritikon je kiu aŭ kio ajn, nia organo ĉiam estas disponebla, kondiĉe ke oni ĉiam antentu la kristanajn principojn, kaj celas nur la bonon de nia movado.

Kun la espero ke, krom la helpo de Dio, ankaŭ la helpo de multaj bonvoluloj ne mankos al mi, mi akceptis mian novan taskon.

Saluton al ĉiuj!

H. Haenen.

OPEN ANTWOORD

aan den Heer H. Damen, loco-voorzitter van den Ned. R. K. Esperantistenbond, en tijdelijk redacteur van „Nederlanda Katoliko”

KARA AMIKO

Ook ik had zes maanden geleden niet gedacht, dat ik mij zoo spoedig verplicht zou hebben gevoeld, het voorzitterschap neer te leggen, en U daardoor te stellen voor de consequenties eener functie, die ge volstrekt niet hebt geambieerd. Meen echter niet, dat mijn bedanken een rechtstreeks gevolg is van mijn aftreden als redacteur. Neen, toen we te Utrecht, na eene openhartige bespreking der feiten, zonder eenige rancune, uit elkaar gingen, had ik nog volstrekt niet gedacht, dat daarop zoo spoedig mijn aftreden als voorzitter zou volgen. Ik zag daartoe volstrekt geen reden.

Maar eerst toen mij het December-nummer onder de oogen kwam, waarvan ik U copie en drukproef had overhandigd, en toen ik daaruit zag, in welken geest de voorloopige redactie, gekozen uit het hoofdbestuur, zich de richting dacht, waarin ons orgaan in het vervolg zou moeten geredigeerd worden, toen bleek mij, dat ons beider meeningen zoover uiteenliepen, dat samenwerking onmogelijk was, althans: dat mijn aanblijven noodzakelijk tot conflicten moest leiden.

En nog in Uw „open brief” blijkt, waar ge zegt, „dat het hoofdbestuur in zijn groote meerderheid volstrekt niet kon meegaan met de wijze, waarop gij meendet in ons orgaan uiting te moeten geven aan uwe persoonlijke meening omtrent bepaalde personen en instellingen.”

Laten we hier maar het kind bij zijn naam noemen : ieder lezer van N. K. weet, dat hier bedoeld is de heer Heilker en het examen-comité.

Maar ik vraag openlijk aan ieder eerlijk lezer van N. K. : heb ik dan anderen dan dezen gespaard, als er meeningen werden verkondigd in strijd met gezond taalinzicht of met onze katholiciteit. Of denkt ge, dat ik anders zou gesproken hebben, wanneer op de plaats van den heer Heilker, of in het examen-comité andere personen gezeten hadden? Dat zij, die aan den weg timmeren, het meest aan critiek blootstaan, is heel natuurlijk. Maar 't ware niet de personen, die ik wilde treffen, maar wat ik als hunne fouten beschouwde. En niets zou mij liever zijn geweest, dan dat gebleken ware, dat ik mij in mijn beoordeeling vergiste. Ieder bewijs hiervoor is echter, ondanks mijn herhaald aandringen, achterwege gebleven. Het blijkt dus, dat men mij niet kwalijk neemt, *wat ik gezegd heb*, maar alleen, dat ik het tegen *die personen* had. De fout, persoonlijk bevooroordeeld te zijn, is niet aan mijne zijde, maar bij hen, die mijne critiek afkeurden. Laten zij liever eens aantoonen, dat mijne critiek ongegrond was, ze zouden daar beter werk mee doen!

Met spanning zie ik nu het werk van den nieuwen redacteur tegemoet, en ben erg benieuwd hoe zijn gedragslijn in deze zijn zal. Dit is echter mijne vaste overtuiging : door het onderdrukken van iemands eerlijke meening kweekt men niet de goede verstandhouding, maar integendeel een sfeer van wantrouwen en afgekeerdheid, die zeer nadeelig is voor ons vereenigingsleven. Rondborstigheid echter van alle zijden ter wille van de goede zaak is de beste grondslag voor ware en blijvende onderlinge waardeering.

Eindhoven, 10 Januari 1931.

P. A. Schendeler.

Het komt ons wenschelijk voor, na deze gedachtenwisseling de discussie te sluiten : met de verzekering, dat het devies van den nieuwen redacteur steeds zal zijn : noch links, noch rechts afwijken, doch «*Ĉiam antaŭen.*»

Redactie.

KLARIGO.

Oni ŝciigis al mi sian miron, ke mi akceptis la redaktoran taskon, de mi nenial aspiritan, kvankam en la jarkunveno-1929 mi konigis min favora rilate la tiam faritan proponon : ĉesigi la eldonadon de l' organo N. K., kaj anstataŭ tio la organon de I.K.U.E. „Espero Katolika” funkciigi kiel organon de la Nederlanda Katoliko Esperanto Unuiĝo.”

Jen mia klarigo: Organo, aperante nur unu fojon ĉiumonate, krom tio konsistante el nur kvar ĝis ses folioj, laŭ mi neniel konvene kaj kontentige povas plenumi la diversajn funkciojn, indikitaj en mia artikolo: „Saluton al ĉiuj!”

Tio estis mia opinio en 1929, kaj estas ankaŭ tia en 1931.

Mia opinio do ne ŝanĝiĝis; tamen la cirkonstancoj aliĝis.

Fariĝinte redaktoro mi esperas ricevia tian kunlaboradon je mia tasko, kaj ankaŭ je mia celado, ke nia movado kresku ekstere, sed precipe interne, tiamaniere, ke sekve de tio pli ampleksa organo kaj ĝia pli ofta aperado baldaŭ ebligu.

H. H.

DIVERSAĴOJ.

En la pasintjara somerkunveno de la Unuiĝo de Lernejestroj de Katolikaj specialaj Lernejoj en la eparĥio Haarlem, komisiono nomiĝis por esplori la dezirindecon pri enkondukado de Esperanto instruado en la unuagradaj lernejoj, kaj raportis pri tiu temo en la aŭtunkunveno. Tiu komisiono konsistis el tri lernejestroj, el kiuj du estas ne-, kaj unu estas jes- esperantistoj.

La aludita aŭtunkunveno okazis la 30an de Decembro lastjare en Haarlem. „De Maasbode” informas pri tio la jenan:

1e. La komisiono raportis rilate la dezirindecon de Esperanto kiel instruifako. La komisiono proponas (unanime Red I) enkonduki Esperanton kiel nedevigan fakon por la 7a instruaro.

2e. Por atingi bonan rezulton estas rekomendinde instrui tiun lingvon dufoje tri kvaronhorojn ĉiusemajne. Tiamaniere la lernantoj post la daŭro de unu jaro estas kapablaj paroli Esperanton kaj korespondi per ĝi.

Per aplaŭdoj la kunveno esprimis sian konsenton kun ĉi tiu konkludo.

Ankaŭ por N. K. estas kialo por aplaŭdi!

Frato Wigbertus van Zon 30-XII-1930 faris en Reusel paroladon dumtrihoran pri Esperanto.

Zorge preparita kaj bonege aranĝita kunveno. La festornamita salonego plenplena je intereseĝuloj. Multaj en- kaj eksterlokaj eminentuloj; ekleziuloj kaj laikoj. Malfermado kaj enkondukado de l' ĉefulomem de l' komunumo. El la diversaj detaloj de l' parolado ni nur atentigu je la utilo eĉ neceso de Esperanto por ni katolikoj. Kial por ni? Niaj relegiaj kontraŭuloj per faktoj laŭte respondas pri tiu demando. Esperanto-agado. estas misia agado.

Nia nelaciĝanta samideano entuziasmigis la aŭskultantojn tiamaniere, ke en la malgrava brabantia vilaĝeto klubo esp. stariĝis. Imitinda ekzemplo!

Laborista Esperantisto de Januaro 1930 komunikas fiere, tute prave, ke la nombro da siaj membroj pliiĝis je 100, dum nur unu monato. Ĉu tia kresko ne povas vigligi ankaŭ nin je pli intensa agado por N. K.

H. H.

FINANCA RAPORTO

1 Jan. '30 — 31 Dec. '30.

Enspezoj		Elspezoj	
saldo 31-12-'29	fl 17.—	organoj	fl 695.77
kotizoj	fl 986.05	kunvenoj	fl 184.30
anoncoj kaj abonoj	fl 96.56	I.K.U.E.	fl 161.75
diversaj	fl 131.25	afrankoj	fl 88.69
		diversaj	fl 78.11
	<hr/>	saldo 31-12 '30	fl 22.24
	fl 1230.86		<hr/>
			fl 1230.86

De penningmeesters der afdelingen en de personen welke geen leden der afdelingen zijn, worden verzocht vóór 20 Februari de verschuldigde contributie te storten op Postrekening 121449, Nederlanda Katoliko, Tilburg.

Penningmeester N. K.

J. A. Leibbrand.

MEDEDEELINGEN VAN HET SECRETARIAAT

De bescheiden voor de aanvraag van de Koninklijke Bewilliging op de Statuten van den Bond werden d. d. 7 Januari door het secretariaat verzonden. Het ligt in de bedoeling van het bestuur deze statuten en het huishoudelijk reglement, nadat deze goedkeuring is afgekomen, te doen drukken om in een tot dusverre nijpende behoefte te voorzien.

Het secretariaat van N. K. liet begin Januari op uitnoodiging van de Centra Esperanto Propaganda Komisio 5200 exemplaren van een beknopte N. K. brochure drukken, die door de C.E.P.K. gratis aan alle cursisten zal worden verzonden. De C.E.P.K. heeft door deze schoone geste wel duidelijk een voorbeeld gegeven, hoe de samenwerking moet zijn tusschen cursus en organisatie. De circulaire werden eind Januari in de lessen bijgevoegd.

N. K. bestelde van het tweede nummer van Katolika Vivo 100 exemplaren, die met een begeleidende en toelichtende circulaire door het secretariaat zullen worden verzonden aan alle redactie's van R. K. Dagbladen, Katholieke autoriteiten, enz. enz.

In verband met een door de Federacio de Laboristaj Esperantistoj aan de Directie der Nederlandsche Spoorwegen te Utrecht verzonden schrijven, is ook door het secretariaat van Nederlanda Katoliko d. d. 16 Januari een schrijven aan de Spoorwegdirectie verzonden. In dit schrijven werd namens het bestuur verzocht om de toestemming tot het dragen van het insigne, gedurende de diensttijd, door het spoorwegpersoneel.

We vertrouwen dat onze leden spoorwegmensen binnenkort weer hun insigne zullen kunnen dragen.

Behoudens goedkeuring door het H. B. kan het secretariaat officieus mededeelen, dat de jaarvergadering 1931 zal gehouden worden te Utrecht op Maandag 25 Mei (2e Pinksterdag).

De uiterste datum vóór dewelke voorstellen voor de jaarvergadering moeten worden ingezonden wordt bij dezen nader vastgesteld op 28 Februari. De afdelingen gelieven hiervan goede nota te nemen.

De Secretaris
J. H. Westen.

„PER BALONO AL LA NORDA POLUSO!”

Grava okazintaĵo en Esperantujo certe estas, la apero de la supre nomita kaj jam multe preparolita verko en la esperanta lingvo.

Antaŭ kelkaj monatoj la tuta mondo estis konsternita de la nekredbla sciigo, ke norvega scienca ekspedicio estis trovinta la lastan restadejon de Andrée kaj liaj du kamaradoj, kiuj malaperis dum sia tragika veturado per la balono „AGLO” al la norda poluso en la jaro 1897-a. Estis sur insulo nomata „BLANKA INSULO” en la nordpolusa maro, ke oni trovis iliajn bone konservitajn korpojn kune kun la provizaĵoj, taglibroj, k. t. p. La gazetoj rakontis ke ĉio estis enbordigita sur la ŝipon, kiu daŭrigis sian kombinitan sciencan kaj kaptadan ekspedicion kaj nur post finita tasko reiros la havenon. La tuta mondo malpacience atendis pliajn sciigojn, sed nenion plu oni eksciis. La gazetoj komencis dubi pri la tuta afero kaj skribis artikolojn pri la fia trompaĵo. Intertempe tamen pluraj gravaj diversnaciaj eldonejoj oferis al la norvega scienca instituto kaj al la posedanto de la ŝipo fantaziajn sumojn por la rajto de sola publikigo de la taglibroj. Oni parolis pri milionoj da dolaroj. Sed vane. Kontraŭe la norvega registaro ordonis absolutan silenton al la ekspedicio kaj samtempe transdonis ĉiujn rajtojn al la sveda registraro kaj per ĝi al la samlandanoj de la retrovitaj herooj.

Kompreneble la scivolo de la gazetoj ne kontentiĝis je tia sekreto kaj pro tio, koncerno de svedaj kaj anglaj gazetoj dungis ŝipon por

fari propran ekspedicion al la nomita insulo por serĉi eventualajn pliajn restaĵojn de la malfeliĉa balona ekspedicio de Andrée. Kaj aŭdu! Tiu ekspedicio trovis la restaĵojn de unu el la partoprenintoj de la balonveturado, kiun la norvegoj ne estis trovintaj, kaj krom tio ankaŭ la tre valoran observolibron de Strindberg, kaj per tio la taglibroj estis tute kompletaj. Kaj nun scienca komisiono prilaboris la trovitan materialon kaj eldonis kompletan science aŭtentikan rakonton. Tiu treege grava libro aperis jam samtempe en dek diversaj lingvoj: sveda, norvega; dana, finna, angla, germana, franca, holanda, itala kaj... *esperanta!*

Ni ĵus ricevus la belegan verkon. La libro enhavas 412 paĝojn kaj multajn interesegeajn bildojn, kelkajn prenitajn de Andrée mem, rivelitajn, post 33 jaroj en la eterna glacio, kaj ĝi estas presita sur luksa papero, estante por tia libro nur la plej bona, sufiĉe bona.

Oni ne kredu ka la enhavo estos lerta kaj por ordinara homa nekomprenebla. Efektive la vero estas kontraŭa al tio. La libro estas tre populare skribita kaj pro tio facile legebla. Vi legos romanon, kiu enhavas pli dramatikajn kaj nervtiklantajn detalojn, ol cerbo de ordinara verkisto povus eltrovi, kaj komencinte la legadon, vi ne povos ĉesi ĝis vi atingos la finon. Vere, tia libro estos la plej brila juvelo de via esperanto biblioteko. La verko estas haveblo ĉe: Eldona Societo Esperanto Stockholm, Svedujo. Prezo: Nebindita Kr. sv. 9. Bindita 11,50 Kr. sv.; por afranko aldonu 0,50 Kr. sv. Kr. valoras fl. 0,67.

Frater Wigbertus van Zon.

ĈU 1931????

Kie restas la katolikaj Geinstruistoj???

Ĉu 1931 donos, kion 1930 rifuzis?

Rigardante le ĵus finiĝintan jaron ni, Esperantistoj, povas esti kontentaj, ĉar multe, tre multe progresis la por-Esperanto-movado. Multaj kursoj ja altiris grandnombran lernantaron. Rigardu ekzemple la Nimegan Radio-Skriban Kurson: 5200 lernantoj!! La ankoraŭ multaj skeptikuloj grandokule nin rigardas aŭdante tian nombron. Sed ni, *katolikaj* Esperantistoj, ĉu ankaŭ ni povas esti tiom kontentaj? Bedaŭrinde mi devas respondi nee!

Ĉu la katolika movado ankaŭ kreskas laŭdezire kaj laŭbezone? Kaj ree mi ne povas jese respondi ĉi tiun demandon! Kial ne? Aŭskultu, mi petas, kaj respondu vi mem:

Antaŭ du, tri jaroj oni ĝojigis min per sciigo ke la anaro de „Nederlanda Katoliko” kreskis tiamaniere, ke ni havas pli da anoj ol „L.E.E.N.” Kaj nun? Nun? Nun?... Nun „L.E.E.N.” havas pl.m. 700 anojn pli ol „N. K.”! Ĉu oni komprenas, kion tio signifas?

Mi al „L.E.E.N.” ne envias ĝian daŭran kaj rapidan kreskadon, tute ne; sed samtempe mi tre, treege bedaŭras ke „N. K.” ne iras

sampaŝe kun ĝi! Kio estas la kaŭzo? Ĉu ni, Katolikoj, ne sufiĉe laboras? Ĉu la katolika fervoro, la katolika sindonemo estus malpli grandaj ol tiuj de la nekatolikaj!? Mi ne scias! - Sed mi persone havas la konvinkon ke la ĉefa kaŭzo estas: la manko de intereso ĉe la geinstruistaro!

Ho, se ili nin helpus! Jes, vere estas ke multaj geinstruistoj jam eklernis Esperanto'n; multaj el ili jam faris ekzamenon; sed ne sufiĉaj!

La pasintan jaron mi jam eligis la alarmkrion: „*Mankas Esperanto-Instruistoj!*” Kaj ankoraŭ nun mi devas diri la samon; Ĉar plurfoje okazas, ke komunuma Registaro volas starigi por infanan Esperanto-Kurson, sed ĝi devas rezigni pro manko de instruistoj! Ni ĉiuj ja scias tre bone, ke nur per la infanoj Esperanto eniĝos la grandan popolamason: „Kiu havas la infanon, tiu havas ankaŭ la estonton!” Kaj, ĉar ni scias ankaŭ kiom granda estas la influo de la instruisto ĉe la infano, ni tiom bezonas la geinstruistojn.

Geinstruistoj katolikaj, venu kaj helpu nin! Ni bezonas ne nur vian personan anecoŝne nur vian Esperanto-sciadon, ni bezonas precipe vian influriĉan kunlaboradon. Venu, por ke la katolika lernejo baldaŭ povu kontentigi la multajn je Esperanto-avidajn geknabojn, venu kaj vidigu al la junularo katolika la grandan valoron kiun Esperanto povas havi por nia Sankta Patrino” la Katolika Eklezio; Kardinalo v. Rossum ja diris: „Esperanto van Dr. Zamenhoff zal aan de kerk veel diensten bewijzen”. Esperanto de Dro Zamenhof faros gravajn servojn al la Eklezio.

Venu, kaj konigu al viaj lernantoj nian katolikan Esperantomovadon!

Tiamaniere nia movado kreskos pli kaj pli; tiam nia nacia „NEDERLANDA KATOLIKO” kaj per ĝi ankaŭ la „INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA” fariĝos potencriĉaj unuiĝoj kiuj povos helpi la Sanktan Eklezion en ĝia malfacila tasko.

Venu: „Nederlanda Katolikeo” vin atendas!!!!

Frater Wigbertus van Zon

Reusel, Januaro 1931-a

KUNVENO DE „SUDA KRUCO,” EINDHOVEN, DIMANĈON LA 21AN DE DECEMBRO 1930.

Post la kuna S. Komunio en la S. Kateria-preĝejo la gemembroj kunvenis en salono de „Volksbond” por matenmanĝi, kaj poste, ĉirkaŭ la 9a la kluba kunveno komencis. Ceestis 17 membroj. La prezidanto, Sro. F. v. Hoesel, malfermis la kunvenon per la kristana saluto, kaj menciis diversajn faktojn el la baldaŭ finonta jaro, dan-

kante la membrojn kaj kunestraranojn pro ilia amika kunlaborado.

Inter la diversaj pritraktaĵoj ni citu :

1. La Ĉe-kursoj. La kunveno decidis peti konsilojn ĉe la religia Konsilanto de N. K.

2. La ekzamenoj. La kunveno opinias, ke estas kontraŭorganize, ke membroj de la N. K.-estraro, kiu instanco devas elekti la membrojn de la ekzamen-komitato, mem estu elekteblaj por tiu funkcio.

3. Religia Cenzuristo. La kunveno opinias, ke estas necese, ke almenaŭ por Nederlando ni havu Religian Cenzuriston pri Esperanto-verkoj, por ke ni sciu, kiuj verkoj estas legindaj aŭ ne por katolikoj.

4. Ekzameno B. Antaŭ ol aprobi la literatur-liston de la ekzamina komitato, la estraro de N. K. petu pri la enlistigitaj verkoj la opinion de katolika pastro, se ne jam N. K. havas oficialan katolikan cenzuriston.

5, Propaganda Komitato. Ĉar evidente la neŭtraluloj ne plu kunlaboras en la Eindhoven'a propaganda komitato, nia klubo decidis, ke nia propaganda komitato denun nomiĝu „Katolika Propaganda Komitato,“ kaj klopodos trovi alian kunvenejon.

6. Legrondo. Laŭ propono de Sro. de Roos oni dicias fondi legrondon, kies regularon la proponinto kunmetos. La kotizo provizore estos f 0.25 pomonate. Dek du personoj tuj aliĝas. Dankante la prezidanto fermas la kunvenon per la kristana saluto.

La sekretariino

A. Philippe.

La Bussuma R. K. Esperantoklubo „Vigle Ni Laboru“. Okazigis en Decembro sian jarkunvenon. La prezidanto parolis pri la nuntempa stato de la esperanta-movado, post kiam la sekretariino kaj kasisto donis raporton pri la pasinta jaro el kiu montriĝis, ke Esperanto ĝojis en pligrandiĝa intereso, ankaŭ en Bussumo.

Per regionkunlaboro pligrandiĝos la venontan jaron la propagando. Poste ni parolis pri la nova regularo, kiu nun estis akceptata kaj estos sendata al la ĉefestraro por konsento. Kiel sekvanta punkto en la tagordo staris parolado de Sro. H. Wannemakers en kiu kelkaj intencoj por la venonta jaro estis priparolataj. Sekve okazis la estrarelekto, ĉar la prezidanto, Sro. P. Pijpers kaj la kasisto Sro. H. Pijpers ne volis esti reelektataj, estis nun elektataj kiel prezidanto Sro. P. Disch kaj kiel kasistino Fino A. de Vrankrijker dume Fino R. de Kort estis reelektata kiel sekretariino. Fine kelkaj proponoj por la regiona kunveno estis aprobatataj post kiam tiu-ĉi agrabla kunveno, kiun preskaŭ ĉiuj anoj ĉeestis, fermiĝis per Kristana saluto kaj „Ĝis baldaŭa revido“.

R. de Kort,
sekretariino de „Vigle Vi Laboru“

GESINJOROJ GESEKRETARIOJ DE LA SEKCIOJ DE „NEDERLANDA KATOLIKO.”

Estimataj Gesinjoroj!

Nia unuiĝo „N. K.” konsistas el 23 sekcioj. El ili nur kelkiuj iam kaj tiam raportas pri la sekcia movado; tamen la plimulto, kompreneble nur pro modesto! Komunikas neniam eĉ unu literon.

Nia organo havas taskon ankaŭ kiel komunikilo; pro tio mi permesas al mi proponi al vi la jenan:

Ĉiu sekcio, senescepte, provizore nur ĉiujare, prezentu por publikigado en nia organo, koncizan, priaferan, neornamitan raporton, esperantlingvan, pri sia agado dum la pasinta jarepoko.

La raporto enhavu nur faktojn, interesigaj ankaŭ je aliuloj krom je la anoj de la loka sekcio. Tiaj estas i. a.: nombro da membroj; kresko aŭ malkresko de ili; kiom da kunvenoj okazis per kio oni povis pliprogresigi la lokan movadon; praktikaj ideoj, prefere efektivigitaj, ne efektivigitaj, ĉar la lastaluditaj estas birdoj, ankoraŭ ne-kaptitaj; ĝenerale nur sciigojn, kiuj povas esti utilaj, aŭ sciindaj ankaŭ al eksterlokaj samideanoj.

Mi konsideras kiel necitindaj: malfermadon kaj fermadon per la kristana saluto, (tiamaniere ja ĉia katolika unuiĝo aŭ rondo komercigas kaj finiĝas); laŭtleĝadon de la protokoloj; konigadon de ĉiuj estraranoj, nov- aŭ reelektitaj, (nomoj de prezidanto kaj sekretario sufiĉas); kiom da ĝojo oni ĝuis dum la kunvenoj (pli interese estas skiiĝi kiom da ĝojĝuantoj ĉeestis). Legante la priaferan raporton, oni facile povas imagi, kvankam ne per tiom de multaj vortoj komunikitaj, tiajn nur malvastlime interesajn aĵojn.

La proksiman fojon mi prezentos al vi proponon pri la laŭvica plenumado de la supre citita ideo.

Samideane via,

H. Haenen.

ESPERANTO-EKZAMENOJ EN 1931. DUM ĈI TIU JARO OKAZOS JENAJ EKZAMENOJ:

Por Diplomo A:

Den HAAG: Sabaton, la 2-an de Majo.
GRONINGEN: Ĵaŭdon, la 14an de Majo.
Den BOSCH: Sabaton, la 6an de Junio.
NIJMEGEN: Sabaton, la 27an de Junio.
UTRECHT: Sabaton, la 24an de Oktobro.

Por Diplomo B:

Den HAAG: Sabaton, la 16an de Junio
ARNHEM: Sabaton, la 7an de Novembro.

Oni siu anoncu sufiĉe frue ĉe la sekretario de la Ekzamena Komitato, Sro. H. J. Bulhuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

Por ke oni povu vidi kiom la intereso por Esperanto kreskis la lastajn jarojn, mi donos ankoraŭ kelkajn ciferojn pri la ekzamenoj de la pasintaj jaroj:

En 1913 komenciĝis la ekzamenoj por A kaj B; dum la du jaroj 1913 kaj 1914 *sukcesis* por Diplomo A: por Diplomo B:

	26	10
1915	33	17
1916	23	8
1917	18	14
1918	8	4
1919	16	3
1920	27	1
1921	24	1
1922	40	10
1923	90	22
1924	77	16
1925	85	19
1926	88	13
1927	243	24
1928	330	26
1929	165	57
1930	<u>385</u>	<u>68</u>

En tute do *sukcesis* en Nederlando: 1678 A kandidatoj, 333 B. kandidatoj.

Reusel, Januaro 1631a.

Frato Wigbertus van Zon

ESPERANTO-EXAMEN.

Arnhem November 1930

DIPLOMA A.

Ter vertaling in het Esperanto :

1. Glas is zeer breekbaar; het is ook doorzichtig.
2. De leerlingen wandelden twee aan twee met hun onderwijzer.
3. De rijkard liet een prachtig huis bouwen.
4. Nu eens regent het, dan weer schijnt de zon.
5. Mijn vader beloofde, dat hij alle paarden zou verkopen en een automobiel kopen.
6. Waar is de sigarenkoker, dien ik in België voor je gekocht had?
7. In Japan wordt ook Esperanto onderwezen.
8. Kent gij den schrijver van dit boek? Ja, ik ontmoette hem voor eenige weken in de wachtkamer van het station.
9. Wat voor boeken leest u graag? Ik lees het liefst werken over ware helden.
10. Ik wilde gaarne weten, of hij thuis was en daarom belde ik vijfmaal.

11. In welke gemeente woont u? En wie is de burgemeester dier gemeente?
12. Men vond in den grond het geraamte van een voorwereldlijk dier.
13. Vroeger woonden zijn grootouders in een groote stad. De vorige week verhuisden zij naar een dorp.
14. Wiens schuld was het, dat dat meisje in het kanaal viel?
15. Waar gaat gij heen? Wij hebben een vrijen dag en gaan tot vanavond visschen buiten de stad.
16. Als ik vrij was, ging ik dolgraag met u mee. Ik moet echter den geheelen dag werken.

Por traduki en la nederlandan ligvon:

DISPUTO DE LA BESTOJ.

„Mi estas la plej utila el vi ĉiuj”, diris la ĉevalo.

„Mi ne nur tiras la veturilon kaj helpas ĉe la kampa laboro, sed ankaŭ sur mi, la plej nobla besto, rajdas elegante generaloj, eĉ reĝoj. Rigardu la ĉevalidojn! Kiel gracie ili saltas kaj kuregas!”

„Tio estas nenio”, bleketas kaprino, „miaj idoj pli gracie saltas ol la viaj, eĉ plej gracie el ĉiuj. Kaj vian utilon oni ne povas kompari kun la mia. Mi nutras per mia lakto la malplej riĉan familion. Vi volas esti la plej nobla besto el ni, kvankam vi ne portas kornojn?”

„La miaj estas la plej fortaj el ĉiuj kornoj,” diras forta bovo, „eĉ la diablo ne havas tiel danĝerajn. Jam sen kornoj mi estas la plej forta. Rigardu tien! Unu bovido ĵus venkis tri ŝafvirojn.”

„Ne ofendu nin!” blekas ŝafo. „Nin ne kreis la naturo por bataĵi kontraŭ sovaĝaj bestoj, sed por alporti al la homo, nia sinjoro, la plej grandan utilon. Ni paciencas suferas ĉiujn mokojn, ĉar mi scias, ke la homo nur min plej amas. Kiu liveras la tiel necesegan lanon? Mi! Kies viando estas la plej bongusta? Tiu de la ŝafidoj.”

„Ĉu la viandon de la kokidoj malŝatas la homo? krias belega koko. „Mi estas la plej bela el vi ĉiuj, mia vesto estas la plej brila.”

La ansero diras: „La homo ŝatas ĉion de mi. Precipe li preferas miajn molajn plumojn kaj la belsonan voĉon mian.”

Tiel bela kiel la via, eĉ pli bela ol ĝi, eĉ la plej bela el ĉiuj bestaj voĉoj, estas la mia,” gruntas porko, kiu ĵus foŝis en koto.

„Vian voĉon mi ne prijuĝas, sed ni ĉiuj, ankaŭ nia mastro, scias, ke vi estas la plej malpura el ni,” miaŭas kato. „Mi ĉiutage lavas min kelkfoje kaj edukas miajn belajn idojn, ke ili sin ankaŭ lavu, kiel eble plej ofte, por ke ili estu la plej puraj el vi ĉiuj.”

„Jes, vi ĉiuj nur pensas pri ornami sin kaj pri infanaj ludoj, sed pli grave estas, ke vi faras al nia maŝtrino la plej grandan malutilon, ĉar vi ĉie kaj ĉiam frandas.” Tion kolere elbojas la malamiko de la kato, la gardema hundo.

Fine la mastro aperas kaj diras: „Estu vi ĉiuj trankvilaj! Ĉiu el vi estas la plej utila el ĉiuj en sia propra loko, kaj la plej bela laŭ sia propra maniero.”

Aan allen, die binnenkort examen doen !

Verzoeken tijdig het volgende studiemateriaal te betrekken.

Heilker. 20 mondelinge examens	f 0,30
Isbrücker-Dirksen. Esp. examen-opg.	f 0,45
Eiselin. Handelstermen	f 0,50
Mees. Struikelblokjes	f 0,50
Heilker. Examenopgaven B	f 0,50
„ Esperanto B	f 2,00

Zoo juist verscheen :

H. J. Bulthuis & Dr. F. C. Dominicus.

ESPERANTO WOORDENSCHAT

ingenaaid f 1,25, in slap linnen f 1,75.

voorziet in een dringende behoefte en mag in géén enkele Esp. bibliotheek ontbreken.

Behalve bovenstaande ook nog tal van andere Nederlandsche en buitenlandsche werken in voorraad, o.a. van Zamenhof, Privat, Ladevèze, enz. in den

ESPERANTO LIBREJO

JOH. BROEKHUIJSEN

Voorstraat 328, Tel. 1263, Giro 23595. DORDRECHT.

KATHOLIEKE ESPERANTISTEN

!!!

Bestelt vanaf heden al uwe Esperanto benodigdheden
uitsluitend bij de :

CENTRALE NEDERLANDSCHE KATHOLIEKE

ESPERANTO BOEKHANDEL

CENTRA KATOLIKA NEDERLANDA ESPERANTOLIBREJO

EINDHOVEN

Alle Studie-, Leer- en Propagandamiddelen

bij ons verkrijgbaar.

